



### El la enhavo:

8-a Kongreso de ĈEA  
Nia mastrumado 1993-1995  
Novaj honoraj membroj  
Necesas paroli esperante  
Agado de niaj kluboj  
Internaciaj aranĝoj  
Esperanto-muzeo raportas



## ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

### DELEGITA RETO EN ĈEĤIO



☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
aperas 6-foje jare. Abono 16 gld.

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio,  
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por  
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla  
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%  
rabato.

**Membrokotizoj:** A 160 Kč, B 80 Kč. (C  
nuligita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G  
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20  
ECU, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 335 Kč komencantoj,  
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová,  
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova  
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

**Sekcioj de ĈEA:** infana, junulara, skolta,  
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-  
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-  
amikara, de esperantaj-kolektantoj

**Komisionoj de ĈEA:** gazetara-informa,  
ekzamena

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

**ĪCO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:** 3330-021/0100,  
Komerční banka, Praha 2

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,  
745 05 Opava

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878,  
252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso  
02/9912126

**Vicprezidanto:** Věra Podhradská, Poříčí 1. 603  
00 Brno, tel. 05/4323 3047

**Sekretario:** Květa Hubnová, Esperanto. p.s.  
1069, 111 21 Praha 1

**Komitatano:** Blanka Gruntová, Vítězná 95,  
784 01 Červenka-Litovel, tel. 068/5105202

**Komitatano:** Vladislav Hasala, A. Dvořákova 1,  
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332  
278, fakso 0631/332 507

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na nábreží 45/25,  
736 01 Havířov, tel. 069/6815253

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Jana Holcova,  
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj:  
Josef Hron, Libuše Krejčí)

**Kontisto:** Jiří Patera, U Rysánky 1534, 147  
00 Praha, tel. 02/460162

**Ĉefdelegito de UEA:** Stanislava Chrdlová,  
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.  
02/9912201, fakso 02/9912126

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724  
0690

**Variabilni simboloj pro platby  
Ĉeskému esperantskému svazu**

- |               |  |
|---------------|--|
| <b>311</b>    | expedice, úhrada koupených knih a materiálu                                      |
| <b>604.2</b>  | pisemné kurzy  |
| <b>604.3</b>  | předplatné Starto  |
| <b>604.5</b>  | předplatné Internacia Fervojisto   |
| <b>668</b>    | dary svazu   |
| <b>694</b>    | členské příspěvky ĈES  |
| <b>694.1</b>  | členské příspěvky UEA  |
| <b>789.1</b>  | sekte mládeže  |
| <b>789.10</b> | sekte ŝachistů   |
| <b>789.11</b> | sekte sběratelů  |
| <b>789.15</b> | ediční fond, Ringo   |
| <b>789.16</b> | subkonta klubů mimo níže uvedených   |
| <b>789.3</b>  | sekte železničářů  |
| <b>789.30</b> | Klub Praha   |
| <b>789.31</b> | Klub Přerov  |
| <b>789.32</b> | Klub Poděbrady   |
| <b>789.33</b> | Klub Ostrava-Vítkovice   |
| <b>789.7</b>  | sekte pedagogů   |
| <b>789.71</b> | členské příspěvky ILEI (jsou zároveň předplatným pro Internacia Pedagogia Revuo) |

Variabilni simboloj uvdajejte na predni straně poŝtovni poukázky, zároveň na zadni stranu do „Zprávy pro příjemce“ napište účel platby. **Upozornění pro majitele účtů u jiných bank:** Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvdajejte nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK PŘÍBRAM, uveďte i variabilni simboloj. Zároveň zašlete na adresu účetního (viz „kontisto“) korespondenční listek o účelu platby. Dojde-li platba s označením „ĈESKY ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme, kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako dary svazu.

Eli Urbanová  
**Mi ĝisvivis  
 Universalan Kongreson  
 en Prago**

Iam kiel ankoraŭ juna mi kalkulis suferitajn sortobatojn. Hodiaŭ male mi ripetadas al mi feliĉajn momentojn, kiujn mi ĝisvivis. Unue mi finis la aŭtobiografion *Hetajro dancas*. Tasko, per kiu min ŝarĝis Josef Rumler. Li eĉ rekomendis al mi antaŭe prepari ĝian ĉeĥan version. Li kompreneble pravis, mia lingvaĵo estos multe pli riĉa, tamen imagu la laboron! Bone tion diras Reto Rossetti en sia prefaco: „Tiu idiomo, kerne vulgara kaj kore sincera, postulis ne malgrandan intelektan penon, dum ŝi pentris la ampleksan tolon de sia plenaĝula historio...“ Reto, kiu bedaŭrinde ne plu estas inter ni ... Reto, al kiu mi ne devis ekspliki celitan strukturon de mia prozo. „Jen ŝi krozas inter nuno kaj paseo, kungluante disajn momentojn laŭ tonda stilo de la pentra kubismo de Braque aŭ Juan Gris, kaj jen en intimaj riveloj ŝi aplikas mezuron ĉe amoscenoj per alternoj de tenero kaj drasto, dum ondas la emocioj.“ Due realiĝis eldono de ĉi tiu mia „super-verko“. Fine! Post kvin jaroj da atendado! (La prokraston kaŭzis la inflacio en Brazilo.) Trie - kia ĝojo por mi aŭtorino - oni -min pro mia

„skandala“ romano ne kondamnis, male aprezis kuragon, kun kiu mi pekulino prezentis min. Se vi permesos, mi citos kelkajn fragmentojn el la recenzoj, kiujn alportis la revuo FONTO:

Jen kion opiniis William Auld: „Se tiu ĉi libro ne furoros, mi malesperos pri la esperantistaro. Ĝi estas unika - eĉ ekster Esperantujo ĝi estus rimarkinda maloftaĵo ... Da aŭtobiografioj ni havas plurajn, notinde la lastatempajn *Rakonto de kampara bubo* de Bruno Najbaro kaj la trivoluman de Gerrit Berveling, sed neniun similan al *Hetajro dancas*, aŭ eĉ kompareblan ... La lingvaĵo kaj stilo de tiu ĉi bela rakonto estas viglaj kaj (kiel kutime ĉe la fortkarakteraj homoj) sufiĉe proprecaj. Dank' al dio, ŝi ŝparas al ni konatajn ekscenojn de Piĉ kaj la t.n. praga skolo. Ŝi konsentas: 'Klare, ke mi ne intencis la legantojn forpeli per tro multe da neologismoj'. Per tio ŝi estas saĝa kaj sagaca, kaj rekonas, ke bizara lingvaĵo la homojn ne logas. Pri unu tamen escepto mi volas forte riproĉi ŝin. Temas pri tio, ke ŝi sufiĉe ofte uzas proponitan bastardan prefikson *po-* 'por ripetiginta ago' (Piĉ). Tio estas nekredeble atenca. Nia fundamenta vorto *po* jam estas ofte uzata prefikse: *poiome*, *popece*, *popare ktp.*, kaj rezulte la nova prefikso estas rekte miskompreniga. Kaj se ni tiun adverbigas aŭ adjektivigas (laŭ normala Esperanta mani-

ero): poe, poa, ĉiu povas konstati la fiecon de tiu arbitra nenecesa propono..." Vilĉjo, mi ĵuras, mi ĝin uzos neniam plu!

Ulrich Becker komencas sian recenzon jene: „Uf! Nekredeble! Ĉu tio eblas en Esperanto? Ĉu la movado tion eltenos? Io tia ne ekzistas ĉe ni, kaj en kelkaj naciaj literaturoj tiaj libroj kapablas abrupte haltigi promesplenajn karierojn kaj kaŭzi politikajn krizojn ... Kiam vi acetos tuj ĉi libron, vi tenos en la manoj unu el la plej kuraĝaj aŭtobiografioj (ne nur Esperantaj)...”

Super recenzo de Shi Chengtai reniĝas la spiro. Ĉu mi meritas tiel



imponan analizon? „La aŭtorino eble provas konĵuri la puran, ampleksan karakteron-naturon. Ŝi eble estas feliĉa, aŭ almenaŭ, libera pli ol ŝiaj fratinoj, kiel Tess, Karenina, Maslova, Li Xiangxiang, eĉ Jane Eyre. Tial mi povas diri: ĉu la romano de Eli Urbanová kreas novan etapon por la (virin)literaturo?... La lingvo, kiun nia poetino manipulas sperte, estas vere beletra, pura, klara kaj parola, kiel murmure fluanta akvo de roĵo, sen balasta vorto, sen longaj tedaj frazformoj. Kvankam ŝi uzas neolo-

gismojn, tamen tiuj jam vivas delonge en nia literaturo, eĉ aplombe kuŝas en PIV, krom la netolerebla Piĉa 'po', kiel prefikso, ĉar en la Fundamento de Zamenhof jam troviĝas prepozicio *po*... Eĉ ŝi kiel poetino ankaŭ prenas teknikon de poezio en la romanon, multaj paragrafoj sinsekvas kiel bildserio, aŭ filmsceno (laŭ Pumpr). Iuj frazoj, vortoj, ĉefe ĉe la komenco de ĉiu paragrafo, ripetas, ties efiko faras la tekston de romano rondelo, oni povas nomi la tutan romanon ĉarma rondela ciklo... la vervo de la verko viglas en ĉiu paĝo... la pura animo (in-ula) dancas antaŭ la publika. Legu, relegu!”

Laŭ Aldo de'Giorgi, de kiu mi devone pruntis sloganon „senkliŝe, senprude kaj sentabue”, ĉar ĝi mian kreadon perfekte karakterizas, ĉio estis jam dirita, tial li en sia Postrecenzo nemulton plukomentos. Vidu, kiom da ĉefaj idiomaĵoj li trovis en la teksto. Mi bone amuziĝis, kiel li pritaksas la ĉefajn protagonistojn: „Ĉar jen Ŝtefo, la edzo, la sultano, la diktatoro, la masklisto, krome sadomazohisto ... Kaj jen Jan, olda, mistera kaj parazitema guruo, certe ne fidinda amanto. Kaj jen Ernesto, la drinkemulo, la vagabondo, ankaŭ lin mi ne konsilus al amikino...” Aldo, vi memorigas al mi certan ĵaluzulon, kiu simile kalumniis ilin, kvankam ne tiel elegante!

Recenzo de Christian Declerck

titolita *Aŭdace honesta romano* aperis en MONATO. Do tamen iu mencias aferon, kiu min siatempe profunde influis: „La promeson koncerne ŝian 'kontakton pri antikva Hindujo', promeson pri okultaj provoj (telepatio, klarvideco, klaraŭdeco, prekogno, aŭgurado) ŝi ne plenumas. Ĉi tio montriĝas ne multe pli ol iluzioj kaj revoj...” Mencio fakte negativa, sed eĉ ne tiel ĝi agrable tuŝis min.

Ĉiuj nomitaj kompetentuloj, William Auld, Ulrich Becker, Shi Chengtai, Aldo de'Giorgi, Christian Declerck, akceptu mian grandan dankon. Akceptu ĝin ankaŭ Gerrit Berveling, kiu zorge tralegis mian manuskripton kaj kiu dediĉis al mi tiom da paĝoj en FONTO. Akceptu ĝin ankaŭ profesoro Ed Borsboom el Nederlando, kiu prijuĝis mian aŭtobiografion kiel la unua, sed kies recenzo sendita al Literatura Foiro estis publikigita kiel la lasta. Akceptu ĝin premiito de FAME Gersi Alfredo Bays, kiu malgraŭ grava ekonomia krizo en Brazilo sukcesis mian libron eldoni.

Unue, due, trie... Kvare - mia verkista kariero paliĝas. Mi ĝisvivis Universalan Kongreson de Esperanto en Prago. Ĉu mi povas deziri ion pli? Mi ree renkontis miajn geamikojn, post 27 jaroj mi denove brakumis neforgeseblan Marjorie Boulton, ree ekvidis ĉarmulon Graham Blakey, al kiu mi en la libro (cetere superflue)

takte diras Gaston, vico da homoj, kiujn mi ŝatas, estas longa, longega... Mi povas renkontiĝi kun vi, kiuj interesiĝas ... Ankaŭ al vi mi dankas tre, tre ...

### **Merkredon mi ŝatas**

Vi demandas, kiel mi ĝojas je dimanĉo? Propre ne tro. Se Ŝtefo almenaŭ ne tiom fumus! Kun kiel alia emo mi laboras, kiam li iam en la salono komponas! Mi miksas farunrostaĵon kaj aŭskultas, kiel li kreas. Kaj mi deziras, ke li sukcesu kaj ke tiu lia rara elano al li eltenu ..

Je merkredo mi ĝojas nepre pli. Tiun tagon ni iradas en la klubon. La strato Smečky estas tuj ĉe la Venceslaa Placo. Ĉu vi vidas la larĝajn lumigitajn fenestrojn? Ĝuste tie ĝi troviĝas. Jen la Mekko de la pragaj esperantistoj. Sed ankaŭ de la aliurbaj kaj de tiuj, kiuj alvojaĝis en nian metropolon de ekstere, el la Oriento, el la Okcidento, el la kontraŭa rando de la mondo. Ne unufoje kunvenas ĉi tie eĉ kelkaj naciecoj kaj vi vane divenas, kiu estas kiu, ĉar ĉiuj parolas la saman lingvon.

Ĉe la pordo kiel kutime atendas amike ridetanta Lorenc kaj donas al ni la plumon kaj ni eternigas nin en la prezenc-liston. Mi penas subskribi min legeble, sed Ŝtefo skizas Ur kaj poste nur tielan linion kaj sur ĝia fino n. Tute interesus min la opinio de

grafologo. Lorenc estas kun lia parafo kontenta. Kaj li embuskas la pluan predon. Kiam mi konscias, ke simile li zorgis jam en la kafejo Louvre kaj ke li hodiaŭ postaradas<sup>1)</sup> en Prago 4! Por ke vi komprenu, la klubo eble dudekfoje ŝanĝis sian sidejon - ĉio estas pli grava ol Esperanto, bedaŭrinde ... Sed kien ĝi moviĝas, tien iras ankaŭ Lorenc...

La subtila sinjorino estas Anjo Bárachová, kasistino de la klubo. Ŝi senĉese kalkulas kaj ion aranĝas, nenio estas pena por ŝi. Anjo, mi petas, Anjo, estu tiel bona ... Anjo, kion ni faros kun tiuj bulgaroj, ili nepre ne havas kie tranokti ... Anjo loĝas en la centro. Ĉion ŝi lasas, kaptas Esperantan flageton kaj rapidas al la stacidomo. La gastojn ŝi lokas en la ĉambron kaj ŝi mem kaŭriĝas en sia miniatura kuirejo sur la benko. Ankaŭ Anjo vivas nur por Esperanto. Vivis...

Sed jam ekrimarkis nin Ŝustr, la prezidanto de la klubo. La longulo. Li klinas sin al ni desur sia alto. - Bonvenon, sinjoro profesoro... Sur mian manon li ekpemis laŭdevan kison. Ŝustr estas atentema al ĉiu. Ne ekzistas tiu, kiun li preterrigardus kaj neglektus. Vi diros - li estas komercisto, li havas tion ensange. Sed ĉe Ŝustr tio ne estas nura rutino. Lia rilato al la homoj estas vera. Kaj la homoj kredas al li. La pragan klubon li gvidos 28 jarojn. Li plenumas

kompreneble ankaŭ aliajn funkciojn. Unu tre pretendan: Li estas ĉefa delegito de la Universala Esperanto-Asocio. La korespondadojn oni al Ŝustr liveras en poŝsakoj. Preskaŭ sep kilogramojn pezas leteroj, kiuj masiĝas sur lia skribotablo kaj kiujn necesas respondi. Ne, mi ne intencas ĉi tie paroli pri liaj modele plenumataj taskoj. Pri la ordenoj, kiujn oni al li denis pro liaj eksterordinaraj meritoj. Mi volas mencii sole pri tio, ke li konstruis la Esperantan bibliotekon kaj ke li trifoje savis ĝian sorton. La unuan fojon dum la germana okupacio, la duan fojon, kiam la klubo perdis la ejon kaj la trian fojon en la jaro 1952 post la dumtempa likvido de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Imagu, ke vi devus hejme deponi du milojn da libroj. Ne ĝis morgaŭ, sed por nedefinite. Verŝajne vi ne estus tro entuziasmaj. Ŝustr ne hezitis kaj konservis ilin en sia loĝejo. Kaj kiel pasis la tempo, li aldonis al ili ankoraŭ tri milojn da volumoj, kromalie el Ĉinio, Vietnamio, Laoso kaj Japanio. Hodiaŭ estas „la biblioteko de Jaroslav Ŝustr“ la plej valora posedaĵo de la Praga Esperanta Klubo<sup>2)</sup> kaj viciĝas al la plej grandaj de tiu speco en la mondo.

Plia signifa personeco, kiun ni ekkonas senpere kaj de proksime, estas Mařík. Jen intelektulo sena de ĉiuj pasioj. Eĉ post pli ol kvardek

jaroj vi vidas lin ĉi tiel. Kvankam ni du jam longe alparolas nin pemome, la vi-dirado daŭras. Eble ĝi estas defenda remparo. Mi ne scias. Mi scias nur, ke mi povas al li kiam ajn turniĝi kaj ke lia informo estos preciza kaj elĉerpa. Li havas nome respektindajn sciojn. Sed ankaŭ riĉenhavan arkivon, en kiun sufiĉa enpalpi. Pri Maŝk mi ne timas. Nomoj de la korifeoj ne enfalos. Ankaŭ pro tio mi lin estimas; ke li kapablis korekti sian opinion pri Rumler. Pri ties progresivaj tendencoj. Kvankam li ne konsentas kun ĉio komplete. Sed mi antaŭkuras. Do nun min imponas, ke li estas la unua profesia radioparolisto de la Esperanta elsendado en la mondo. Tial li parolas tiel flue, tiel memkomprene, sen ia ajn tremo, tial li prononcas tiel perfekte, ke oni aŭdas ĉiun unuopan sonon...

Merkredon mi ŝatas. Multe pli ol dimanĉon. Merkrede ni iradas en la Esperantan klubon.

#### **Rimarkoj de la redaktoro:**

- 1) Jen la kritikata prefiksa uzo de *po-* ĉe verboj: *postaradi* stari po pluraj staroj (stari, sed ne fikse, male iome moviĝante, ekz. antaŭ vendeja montrofenestro aŭ atendante iun ĉe stratangulo, antaŭ klubeja pordo k.s.).
- 2) Nun lokita en Esperanto-muzeo de Česká Třebová.

#### **Svaz hledá nebytové prostory**



Svazové materiály, převážně knihy, jsou v současné době uskladněny v provizorních vlhkých podmínkách, ve kterých jim hrozí zkáza. Proto svaz hledá vhodné prostory (cca 240 m<sup>2</sup>), např. v domě některého člena, kde by našly útočiště. Nabídky zasílejte na svazovou adresu.

**25.1.97 parolis en Radio Praha la gvidanto de la Blindula sekcio de ĈEA Jiří Vychodil pri Esperanto-helpiloj por blinduloj.**

#### **Papa saluto en Esperanto**

La vatikana gazeto „L'Osservatore Romano“ (jarkol. 134, n-ro 78) enpresas paskan inaŭguran saluton „al la popoloj kaj nacioj de la tuta mondo“ en multaj lingvoj; la lasta sonas: „Di espressione esperanto: FELIĈAN PASKON EN KRISTO RESUREKTINTA!“

**FRANTIŠEK KOZIK**

16.5.1909 - 5.4.1997

La unuan aprilan sabaton alportis nia televido tristan informon pri forpaso de unu el plej popularaj nuntempaj ĉeĥaj verkistoj, kiu estis ankaŭ favoranto de nia movado kaj honora membro de nia asocio.

František Kožík naskiĝis en Uher-ský Brod, tie frekventis ses-klasojn de gimnazio, sed abiturientiĝis en Brno (1927). En Brno li studis samtempe juran fakultaton kaj konservatorion (reĝisorado kaj dramaturgio), poste ankaŭ filozofian fakultaton. Jam kiel studento li komencis aktori kaj verki operetajn libretojn. Ekde 1933 li aktivis en radio-stacio de Brno kiel parolisto kaj dramverkisto (radio-dramo Cristobal Colón); li partoprenis ankaŭ programojn de la Esperanta elsendado de Verda Stacio. En 1941 li transiris al Prago, kie li laboris ne nur ĉe radio, sed ankaŭ ĉe filmo. Samtempe li verkis poemojn, dramojn kaj romanojn, el kiuj lin plej famigis la biografiaj de famaj personoj (Cervantes, Camões, Komenio, de Sade, Deburau, Karolo IV, Mánes, Čermák, Braunerová, Tyl, Vojan, Těsnohlídek, Janáček, Zátoupek).

Lia plej fama verko estas *La plej eminenta el Pierotoj*, romano pri la franca mimo de ĉeĥa origino Deburau, kiu fariĝis esperiga verko dum la nazia okupacio. La verko

estas tradukita en Esperanton kaj enkomputiligita, sed la eldono finance malfacila. En 1992 aperis esperantlingve lia romano pri Komenio *Lumo en Tenebroj* kaj en heredaĵo de J. Vondroušek troviĝas manskribo de la traduko de romano *Super valoj mate-niĝas* pri hetmano Šarovec dum la tridekjara milito (la heroon la aŭtoro elfantaziis).

La aŭtoro postlasis pli ol cent librojn, do ne eblas ĉiujn mencii, nur rekomendi, ke vi vizitu bibliotekon kaj tralegu iun el liaj verkoj.

- mm -

## SEMAJNA KELI-KONGRESO

Týdenní kongres KELI se uskuteční od 3.6.1997 v maďarském městě Zalaegerszeg. Bližší informace poskytně Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/5651.

## FONDKONGRESO

DE LA NOVA

## TUTSLOVAKIA

## ESPERANTO-

## ORGANIZAĴO

okazos en

## Hotelo Esperanto

en Pribylina de la 31-a de majo ĝis la 1-a de aprilo 1997. Aliĝoj ĉe:  
Esperanto-klubo, Strojársená 3,  
040 01 Košice



## Ankoraŭfoje pri Havířov

Neniu dubas, ke la ekzercado de nia lingvo dum niaj renkontiĝoj estas utila kaj necesa. Tial mi *parte* konsentas ankaŭ kun s-ano Mendl, kiu kritikis en pasinta numero de Starto uzadon de la ĉeĥa lingvo dum kongreso en Havířov. Krom la gastoj el Slovakio vizitis kongreson neniu alilandano. Sed male en la salonego sidis multaj neesperantistoj, kion prave asertas ankaŭ s-ano Mendl: oficialaj urbaj funkciuloj, kursanoj, lernantoj, familianoj-neesperantistoj, konatuloj. Propagando de niaj lingvo kaj ideoj inter ili tute ne okazus, se ili tutan tagon aŭdus ion fremdlingve. Neniu el ili eksciis ion pri niaj problemoj, sukcesoj kaj planoj.

Sed tute mi ne povas konsenti kun la ironia stilo de s-ano Sládeček en la januara numero de „Informilo de han-



dikapuloj“, laŭ kiu ĉeesto en la kongreso estis „perdita tempo“. Miaopinie plejmulto de ĉeestintoj estis kontentaj ne nur pri perfekta organizo, sed sendube ankaŭ pri riĉa kaj interesa programenhavo.

Jaroslav Žák

## Demokratia klubo

Neniam mi plene komprenos la miraklon, ke amikoj de d-ro Zamenhof eklernis Esperanton, kiam li venis inter ilin kun la Unua Libro kaj sciigis, ke li kreis novan lingvon, neŭtralan, simplan, sed kiun neniu regas, per kiu nenie eblas interkompreniĝi, en kiu nenio estas verkita. Tamen ili lernis ĝin por trarompi la barojn inter la popoloj. Kaj post 9 jaroj eĉ la granda franca eldonejo Hachette eldonadis E-lingvajn librojn. Vera miraklo!

Nun la situacio estas tute alia, ni havas multon por oferi, ni nur devas engaĝiĝi, racie, delikate, sen promesado de nerealaĵoj.

Mi ricevis tian eblon post membriĝo en Demokratia Klubo, kies prezidanto prof. ing. Zdeněk Pavlík DrSc, estro de la katedro pri demografio en la naturscienca fakultato de la Karla Universitato, petis min esperantigi materialon „Demokratio teorie kaj praktike“ kaj aliĝilon al la klubo.

En septembro kaj januaro mi povis en la klubo paroli pri Esperanto kaj UK.

Jiří Laube  
Kratochvílova 969  
413 01 Roudnice

**FERILOKO „ESPERO“  
EN SKOKOVY**

Vintrofinan amikan stud-restadon en la bandomo kaj pensiono ESPERO de s-ano MUDr. Josef Hradil, apud Mnichovo Hradiště, meze de la naturo en la Ĉeĥa Paradizo, apud arbaro, partoprenis 13-16 marto 1997 kelkdek esperantistoj kaj adeptoj el pluraj lokoj el inter K. Vary kaj Zlín. Amikan etoson plu levis ĉa bongustaj manĝoj trifoje tage.

Al la esperantologia programparto kontribuis d-ro Hradil, mgr. Zd. Hršel kaj J. Mařík; pri sia brazila vojaĝo kaj laboro en la esperantista kolonio Bona Espero rakontis, kun projekcio de koloraj fotoj, s-ano Chytil el Pře-rov, ĉeĥlingve, pro ĉeesto de junulinoj el la samdoma gimnastikista grupo. - La anaro fartis bone en la familiareca medio. D-ro Hradil donis kurachelpon al pluraj ĉeestantoj, i.a. per sia unika elektra aparato (je kosto de la Sano-asekurejo); ebleco de masaĝoj kaj „perlet-banoj“, de matena korpotrejno aŭ „aerobic“; bus-ekskursoj en la Ĉ. Paradizon.

Pro la cititaj motivoj povas antaŭĝoji ĉeestontoj de la aŭtuna feria resaniga kaj studforma kunesto en agrabla esperantista medio en la pensiono ESPERO, 10-17 novembro 1997 (Fervoja stacio Loukov, Mn. Hradiště, linio Praha-Turnov, de tie buse 6 km). Aliĝilo kun teknikaj

detaloj ricevebla ĉe MUDr. Josef Hradil, Družstevní 1161, 295 01 Mnichovo Hradiště, tel. 0329/771 339 - Pensiono Espero, Skokovy, 512 64 Vyskeř, tel. 0329/ 789 505. El la programoj: kursoj por komencantoj, progresintoj, konversaciaj rondetoj, prelegoj, ludoj, videofilmoj. Loĝado en 2 ĝis 4-litaj ĉambroj. Atendebla ĉeesto de 60 - 80 homoj. Ĝis la revido tie!

**Informoj de la ĉefdelegito de UEA  
por Ĉeĥio:**

Jen kelkaj bazaj informoj pri ĉeĥaj individuaj membroj de UEA:

En la jaro 1996 estis en Ĉeĥio entute 129 individuaj membroj de UEA (sekve nur IM), de tio 11 dumvivaj membroj (inter inter ili 4 honoraj membroj de UEA), 25 en la kategorio MA (membro-abonanto) kaj 83 en la kategorio MJ (membro kun jarlibro). Ĉijare ĝis nun ni havas 82 individuajn membrojn de UEA, de tio estas 11 dumvivaj membroj, 25 en la kategorio MA, 42 en la kategorio MJ kaj 4 en la kategorio MG (membro kun gvidlibro).

Rigardante ĉi suprajn numerojn ni konstatas, ke la nombro de individuaj membroj en Ĉeĥio draste malaltiĝis kompare kun la pasinta jaro. Sed estas nenio eksterordinara, male norma-

la fenomeno, kiun spertas UEA dum multaj jaroj: pro UK en la koncerna lando aliĝas multaj novaj individuaj membroj nur por povi ŝpari, ĉar IM (krom la kategorio MG) havas grandajn rabatojn aliĝante al la UK. Tamen, mi esperas, ke nia nombro ankoraŭ pligrandiĝos ĝis la fino de ĉi tiu jaro.

El niaj IM entute 38 plenumas libervolan honoran funkcion de UEA-delegito, inter ili 25 kiel delegitoj por sia urbo (D), 3 vicdelegitoj (VD) kaj 29 fakaj delegitoj por sia fako (FD). Por pli bona imago pri la diseco de nia delegita reto mi preparis aldonitan mapon (kiu ankaŭ aperos en la jarlibro de UEA). De ĝi estas klare videbla la fakto, ke troviĝas grandaj teritorioj sen delegito. Eĉ pli bedaŭrinde estas, ke mankas delegitoj eĉ en grandaj urboj kun granda Esperanto-tradicio, ekzemple Plzeň kaj České Budějovice.

Mi komprenas, ke temas pri honora funkcio, kiu portas nur laboron kaj eĉ kostas monon. Sed aliflanke tiuspeca laboro pro sia hobbio povas porti al delegito ĝojon kaj novajn amikajn rilatojn. Do, se vi volas fariĝi delegito de UEA, ne hezitu konatiĝi kun la kondiĉoj kaj se vi plenumos ilin, ekagi, ke nia delegitaro kresku.

Mi volas atenti, ke la delegita laboro

estas grava nen nur por reprezentateco de nia respubliko kaj ĝiaj teritorioj kaj urboj ene de UEA, sed ankaŭ por reprezentateco de UEA rilate al ekstera mondo. Tial ne ĉiu interesato povas fariĝi delegito. Laŭ la postuloj de UEA nepras esti minimume unu jaron individua membro de UEA, bone regi Esperanton kaj ricevi agnoskon de landa ĉefdelegito, kiu per tio garantias al UEA, ke la koncerna persono kontentige plenumos siajn libervole akceptitajn taskojn. Mi sincere diru, ke mi kiel ĉefdelegito de UEA por ĈR ne memstare plenumas tiun mian taskon, sed kunlabore kun la komitato de ĈEA, precipe pro la fakto, ke pli da personoj pli bone pritaksos kapablojn de unuopaj kandidatoj, do pli bone decidus, ĉu la koncerna persono estos bona reprezentanto de nia Esperantomovado.

Fine de ĉi tiu informo mi nomu unuopajn delegitojn, ke ankaŭ tiuj, kiuj ne posedas jarlibron de UEA povu ekscii pri ili.

**Benešov u Prahy:** V. Stibůrek, D kaj FD  
**Brno:** mag. Ž. Hršel, D kaj FD, inĝ. J. Werner, FD

**Dobřichovice:** d-ro P. Chrdle, FD, mag. S. Chrdlová, FD

**Havlovice nad Úpou:** M. Šváb, D kaj FD  
**Hořice v Podkrkonoší:** F. Patera, D

**Jablonec nad Nisou:** M. Hillebrand, D  
**Karlovy Vary:** inĝ. M. Bloudek, D kaj FD

**Kladno:** inĝ. J. Krob, D, J. Petera, FD  
**Kosmonosy:** R. Heřman, D kaj FD

Liberec: L. Špína, D kaj FD  
Mnichovo Hradiště: d-ro J. Hradil, D kaj FD

Olomouc: L. Láni, FD

Opava: inĝ. V. Kočvara, D kaj FD

Ostrava: D. Kočvara, D kaj FD, G. Heczko, VD, V. Sládeček, FD

Pardubice: J. Rýznarová, D, L. Srbová, VD

Poděbrady: P. Polnický, D

Praha: inĝ. J. Trojan, D kaj FD, d-ro J.

Jermář, FD, inĝ. V. Dvořák, FD

Prostějov: F. Arnošt, D kaj FD, J. Liška, VD kaj FD

Přerov: J. Tomášek, D kaj FD

Roudnice nad Labem: J. Laube, D

Rudolice: inĝ. Z. Polák, FD

Strážnice: V. Hasala, D kaj FD

Svitavy: L. Rýznar, D kaj FD

Tábor: d-ro F. Rytř, D

Třebíč: P. Sittauer, D kaj FD

Třinec: A. Milatová, FD

Ústí nad Labem: d-ro V. Novobilský, D kaj FD

Vyškov: inĝ. J. Vojáček, D kaj FD

Viajn demandojn rilate al la individua membreco de UEA bv. direkti al mia adreso:

**Stanislava Chrdlová, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice.** Respondojn, kiuj povus interesigi ankaŭ la ceterajn, mi publikigos en Starto.

S. Chrdlová

**Venu ĝui Esperanto-etoson kun KAVA-PECH:**

**FLUGKARAVANO al UK kun aldonaj turismaj programoj:**

**1997-07-17/08-02:** Prago - Frankfurto

- Adelaide (partopreno de la 82a UK)

- Sydney (trarigardo) - Novzelando (Auckland, Rotorua) - Singapore

(trarigardo, ripozo) - reen.

Prezo (por loko en dulita ĉambro) 88600,- Kč

**La 17-a FISAIC Film- kaj Videokonkurso. Brno 1997-10-18/21**

Evento por fervojistoj kun laborlingvoj la franca kaj la germana, tamen se aliĝos esperantistoj de la landoj, kies lingvo ne estas oficiala, funkcios kiel oficiala laborlingvo ankaŭ Esperanto.

**Flugkaravano al 3-taga internacia marŝo. Japanio: Tokio kaj ĉirkaŭaĵo: 1997-10/28-11/04.**

Tritaga marŝo 3 x 10, 3 x 20, 3 x 30 aŭ 3 x 50 km, kiun partoprenadas regule kelkmil partoprenantoj. Aldona trarigardo de Tokio. Pasintjare KAVA-PECH partoprenis unuan fojon kaj ekkomprenis, ke estus bone veni tien kun internacia grupo de esperantistoj. Ĉu la ideo realiĝu? Eksperimento. Prezo: 58800,- Kč.

**La 2-a EVI (Esperanto-Videofestivalo Internacia). Trutnov 1997-12-27/29**

Dua internacia videofestivalo. La unuan en Brno ĉeestis 109 partoprenantoj, kiuj vidis Esperantajn filmojn de 5 landoj (Ĉeĥio, Francio, Germanio, Japanio, Svislando). Krome okazos dum la samaj tagoj kursoj de Esperanto.

**Jarŝanĝa Esperanto-renkontiĝo. Trutnov 1997-12-29/1998-01-02.**

Amuza programo inkluzive skiadon kaj promenadon, ĉiu partoprenanto nepre kunportu bonan humoron. Daŭrigo de lingvaj kursoj (laŭtemaj konversacioj)

**Bonvenigo de nova jaro en Prago. 1998-01-02/04**

Turisma renkontiĝo en Prago (ne nur) por la partoprenintoj de antaŭaj du aranĝoj.

Pli da informoj kaj aliĝilojn vi ricevos de:

**Petro Chrdle, KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice  
Tel.: (02) 9912201, Fax: (02) 9912126, E-mail: chrdle@kava-pech.cz**

**Ĉu vere ne plu intereso pri Esperanto?**

En ĉi tiu artikoleto mi volas prezenti

kelkajn spertojn kolektitajn dum eldonado de Esperanto-libroj kaj speciale de lingvaj helpiloj por ĉeĥaj esperantistoj.

Multaj certe scias, ke mi fondis negrandan entreprenon KAVA-PECH (mallongigo de la ĉeĥa *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEtra CHrdleho*). Ĝi jam estas sufiĉe konata kiel aranĝanto de fakaj konferencoj (plejparte por Karola Universitato en Prago kaj por fervojistoj), sed ankaŭ por esperantistoj (AdE, SAT, UEA, aŭ propraj aranĝoj, ĉu memstare, ĉu kunlabore kun ĈEA).

Ĉuste de la fakaj aranĝoj, kiuj portas ofte bezonon eldoni fakajn librojn (prelegkolektojn) en tre malalta eldonkvanto, originas agado de KAVA-PECH kiel profesia eldonejo. Vane mi strebis konvinki eldonejojn, ke multaj prelegkolektoj estas tiom valoraj, ke ili meritis porti ISBN (internacian standardan libronumeron), krom se mi pretus pagi astronomiajn sumojn. Tial vole nevole mi estis devigata mem aliĝi en la sistemon ISBN kaj komenci profesie produkti librojn. Sed mi ne bedaŭras. La eldonadon trovis tre interesa ne nur mi mem, sed ankaŭ mia edzino, kaj hodiaŭ ni jam povas fanfaroni, ke ni aperigis ĝis nun 44 librojn (inkluzive 4 en finpreparo).

De tiu kvanto 27 eldonajoj (do pli ol duono!) havas iun rilaton al Esperanto: 11 estas skribitaj en Esperanto (aŭ origine, aŭ tradukoj de la naciaj lingvoj), 5 estas parte en Esperanto, parte en la ĉeĥa (inter alia Esperanta-ĉeĥa vortaro kaj lernolibro *Esperantem za 3 mĕsice*), 4 enhavas E-resumojn aŭ iun parteton en Esperanto kaj 8 estas skribitaj en la nacia lingvo (plejparte la ĉeĥa), sed temas pri la traduko el Esperanto.

Mi do kuraĝas diri, ke kun la eldonado de Esperanto-libroj kaj ilia distribuado mi havas spertojn. Nun mi montru kelkajn trajtojn de tia laboro, precipe la reagojn de librovendistoj kaj librodistribuantoj, kiujn mi aŭdadas dum ofertado de niaj libroj.

Oftege mi aŭdas: Esperanto? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas? La tempo, kiam estis intereso pri ĝi, ja pasis antaŭ longa tempo. Neniu demandas pri Esperanto. Kiu aĉetu tion? ktp.

Ne tiom gravas por ni, ĉar estas eĉ nia iuspeca sporta disciplino, ke ni klarigas pacience, argumentas, kaj ofte eĉ sukcesadas konvinki librovendistojn, ke ili aĉetu kelkajn ekzemplerojn. Jam kelkfoje okazis, ke iu librovendejo almen-dis forvenditajn lernolibron aŭ vortaron. Ĉar tia okazaĵo estas granda festo por ni, ni kun Stanjo ĉiam tostas je pli da tiaj sukcesoj. Sed ne zorgu, ne estas tiom

ofte, ke ni fariĝu alkoholdependaj ebriuloj!

Tiaj almen-dis estus certe ĝojiga fenomen-o, se ili ne estus tiom rare kaj se ili ne estus akompanataj per tute alia fenomeno, kiu igas nin tre malgaja. Mi nomu almenaŭ kelkajn ekzemplojn: En Hořovice, dum mia dua vizito de la librovendejo post preskaŭ unu jaro mi metis specimenojn de niaj libroj sur la tablon kaj la estrino tuj montris al la vortaro kaj lernolibro de Esperanto dirante, ke „neniu interesigas pri tiu via Esperanto, do post multaj monatoj mi donacis la du aĉetitajn en la tombolon“. Alia ekzemplo de la granda librovendejo sur Svoboda-placo en Brno, kie la estro aĉetis jam antaŭ unu jaro la plej grandan kvanton (po 20 ekzempleroj). Sed dum la venonta vizito li respondis, ke la tuta stoko estas apenaŭ tuŝita, nome li vendis unu vortaron kaj unu lernolibron. Kaj mi ne povas argumenti, ke li havus ilin ie kaŝite: li havis ambaŭ titolojn dum multaj monatoj en la montrofenestro.

Mi eĉ ne miras, ke la librovendejoj kun tiaj spertoj aĉetis nenion de niaj novaĵoj, eĉ de tiuj, kiuj estas bone vendataj (cetere, la ĝis nun plej bone vendata libro de nia eldonejo estas *Novinky z pravopisu a tvarosloví* de R. Brabcová). Certe mi ne bezonas klarigi, ke mi sentas min tiaokaze

preskaŭ trompulo, kiu konvinkas iun aĉeti de mi nevendeblaĵojn, do perdi sian monon.

Mi multe pripensas la kialon. Dum komenca periodo de nia eldonado mi strebis konvinki esperantistojn, ke ili demandu en la librovendejoj pri vortaroj kaj lemolibroj de Esperanto, eĉ se ili ne intencas aĉeti ilin, ke la librovendistoj vidu intereson kaj mendu ilin. Mi ja estis sincere konvinkita, ke iu preterpasanto, plejparte iama esperantisto aŭ eĉ ne esperantisto, pro scivolemo aĉetos ilin, do la vendejo ne perdos. Post supre menciitaj spertoj mi ne plu faras tion, ĉar mi ne volas esti malhonesto post la bedaŭra sperto, ke vere temas pri apenaŭ vendebla varo.

Nun mi fine ekkomprenis, ke ne estas alia vojo, ol pacience strebi levi konsciencon pri Esperanto (do ankaŭ scivolemon) de ĝenerala publiko. Sed por tio ne sufiĉas unu persono. Mi mem faras, kion mi povas. Mi jam sukcesis instigi du intervjuojn kun mi en la gazeto *Knihy 96* kaj *Knihy 97*, same kiel en *Internet 4U* (legu: for ju), en kiuj mi laŭ miaj ebloj kaj kapabloj objektivite informas pri Esperanto.

Tio ja estas neniua nova ideo. Ni ĉiuj, esperantistoj, sentas bezonon aperigi informojn pri Esperanto. Sed tio ne

sufiĉas, ne sufiĉas ja scii pri iu bezono. Ni devas ja vere serĉi, kie estas konvena medio, en kiu ni povu informi (plej bone samfakulojn). Esperanto ne ĉiam devas esti en la titolo. Eĉ pli bone, se temas pri io alia kaj Esperanto estas nur menciita, ekzemple kiel ĝi bone servis por ..., ĉar se iu infektita persono komencas mem demandi por ekscii pli, estas pli akceptema por novaj informoj (ni kredu ke ĉiam objektivaj informoj), do la rezulto estas pli efika.

Nu, mi komencis pri libroeldonado kaj finas pri varbado al disvastigado de informoj pri Esperanto. Ĉar nur dum vendado de esperantaj libroj mi ekkomprenis la ekzistigan neeviteblan bezonon de tio. Por ke vi bone komprenu, mi ne pledas por kaptado de novaj movadanoj, konvinkado, ke niaj viktimoj tuj eklernu Esperanton. Ni ne agu kiel religiaj sektoj! Ni komprenu, ke ĉiuj havas jam sian vivon organizita kaj ni ne atendu, ke ni sukcesas dum informado nur, se ni esperantistigos iun kvanton da personoj. Tio ja estos en ĉi tiu momento, kiam forestas la ĝenerala konscio pri ebloj de Esperanto kaj lingva problememo entute, nur duaranga tasko. La unua kaj la plej grava afero estu, ke la ĝenerala publiko estu objektivite informita kaj perdu multajn antaŭjuĝojn regantajn rilate Esperanton. Nu de tiamaniere preparita popolo povas

veni pligrandigo de intereso pri Esperanto.

Resume kaj kongrue kun la titolo de la artikolo: Vere estas ĉitempe malpli granda intereso pri Esperanto, ol estis antaŭ kelkdek jaroj. Sed ni ne kulpigu la homaron. La kulpo estas niaflanke. Ni do ne atendu miraklojn kaj ekagu. Ĉiu, kiu vere kredas je utileco de Esperanto, parolu kaj verku pri ĝi, objektivite, ne fanatike, paciencie. Kaj mi kredas, ke la rezultoj venos. Kaj post iu tempo eĉ la lernolibroj de Esperanto kaj Esperantaj vortaroj estos demandataj en librovendejoj. Tio estos certe la unua signo, ke nia varbado estas efika. Kaj mi, kiel eldonisto, se mi ĝisvivos tion (je kio mi, eterna optimisto, esperas, kvankam mi konscias, ke temas pri malrapida evoluo), certe ĝoje informos vin pri tio.

Petro Ĉrdle

### Koncize

Apud la krematorio en Strašnice troviĝas belega nova hotelo „Don Giovanni“ (lito: kvar mil Kč), kies direktoroj estas 1/ aŭstriano, 2/ ĉeĥo Václav Vitek, filo de la E-pioniro Josef Vitek, siatempe aktiva en la E-Junularo. Li akceptis tre amike mian viziteton kaj ni rememoris la tempojn kaj amikojn pasintajn. Lia frato Josef, pli aĝa, kun ŝtatanecoĵ ĉeĥa kaj

franca, estas direktoro de komerca kompanio en Dijon (en ĝia linceo li estis studinta). Josef la lasta aŭtuno vizitis kelkfoje la E-klubon en Praha.

11.4.1997 „minoritis“ dum tri horoj la elsendon „Bona mateno“ de Radio Praha /III/ d-ro Ivo Železný, siatempe tre konata juna esperantisto kun bonega lingvoscio, nun posedanto de la plej granda libroeldonejo en Prago. Li iomete plenumis nian atendon: li deklaris sin esperantisto kaj diris, ke esperanto estas la sole vivanta lingvo el la planlingvaj projektoj kaj ke ĝia kulturagado egalas al tiu de unumiliono nacio.

La praga klubano Mgr. Bohumil Bouzek, kiu en majo volas festi sian unujaran esperantistecon, vizitis (interŝanĝe) sian konatan samideanon apud Moskvo kaj bildrakontis en du kluboj. Li laŭdis la moksvan klubon, kie oni interparolas nur en esperanto



(kia malo kompare kun Prago!). En EK Praha li rakontos pri sia tre kontentiga dusemajna restado en Rusio la 17-an de majo.

Jar. Mařík



## KLUBA VIVO

**Ostrava-Vítkovice:** Jarkunveno elektis novan komitaton: Drahomír Kočvara (prez.), Ladislav Němec, Gustav Heczko, Pavel Jarolím.

**Kafejo Esperanto en Frýdek-Místek:** 9.3.97 Ĉe la Pacifiko (V.Kočvara), Greklando (J.Čejková), 13.4.97 Norda Afriko II (M.Volný), Mondaj politikistoj (J.Hromádka), 11.5.97 Brazilo II (L. Chytil).

**Olomouc:** 14.1.97 okazis kunveno de kluboj Olomouc-Prostějov-Přerov, plua en Prostějov 6.2.97.

**Vizito el Brazilo:** Klubojn en Ostrava kaj Přerov vizitis 16-jara brazila studento Caio Sylva post siaj restadoj en Germanio kaj Pollando. Liaj prelegoj per perfekta Esperanto entuziasmigis ĉiujn aŭskultantojn.

**Ústí nad Labem:** 30.1.97 la klubo elektis novan, nur 23-jaran klubestron, Libor Mikulášek. Nova klubadreso: *E-klubo, poŝtkesto 229, 400 01 Ú/L.* La kunvenoj ĉiun lastan ĵaŭdon en monato okazas en nova kunvenejo: Universitato JEP, katedro de biologio, strato České mládeže 8.

**Třebíč:** La klubo akceptis nomon *Klubo de Esperanto kaj de aliaj mondlingvoj nome de Theodor Kilian*, ĉar la ekonomia situacio trudas instruadon ankaŭ de aliaj lingvoj apud Esperanto en la fama tendaro Lančov.

## Ni kondolencas

- La 11-an de februaro 1997 mortis en sia neĝisvivita 74-a jaro instruisto **Josef Chvosta** el Poděbrady. Li instruis en SET Lančov, kontribuis al E-gazetaro per konkursoj por geknaboj (Juna Amiko), per konversaciaj kaj vortaraj temoj (ekz. Starto) kaj per tradukoj (Norda Prismo, Nica Literatura Revuo). El liaj tradukoj plej gravas F.L.Věk de A. Jirásek.

- La 2.1.1997 mortis en Tábor s-ano **Ladislav Dvoraň** (66 jaroj)

- En Karlovy Vary forpasis s-ino **Růžena Taušová** la 25-an de januaro 1997 en sia 86-a jaro.

- La 31.1.1997 mortis dumviva membro de ĈEA kaj klubano en Přerov ing. **Vladimír Ondryáš**.

- Januare 1997 forpasis meritplena ano de jabloneca klubo **Antonín Pánek**.

## TEJO-seminario pri informado

*Aŭdigi niajn voĉojn*

**Budapeŝto 27.4.-4.5.1997**

preparolos problemojn kiel verkadon de gazetaraj informoj, organizadon de gazetara konferenco, intervjuadon, preparadon de TTT-paĝo por Internet.

## Vizitinte ĉeĥajn urbojn

Japana esperantisto Kumaki Hideo aperigis artikolon pri sia vojaĝo al UK, interalie li skribis: *En Prago, en la urbo Znojmo kaj precipe en Prosimerice mi vidis, ke homoj klo-*

*podas plu bonigi siajn vivojn per propraj manoj, kvazaŭ ili fieras, ke ili perdis neniom da kuraĝo antaŭenmarŝi, dum ili posedas grandan teron kaj riĉan rikolton. Mi vidis homojn en Prosimerice, kiuj gardas bonajn havaĵojn hereditajn de la antaŭa sistemo, kiel iliaj prapatroj gardadis kaj restigis al idoj kastelon Karlstejn dum mil jaroj. Mi estis emociita, ke en Prosimerice estas grave gardata zorgado al etuloj en la vartejo; al la komuna domo por maljunuloj kaj al klerigado en la kultura domo.*

**La XIX-a ĉebalta esperantista printempo MIELNO (ĉemara) 9.-15.6.1997 apud Koszalin**

Nemultekosta aranĝo de Pola EA. Antaŭtagmeze libera programo. Posttagmeze kaj vespere konversaciaj rondoj, prelegoj, renkontiĝoj kun interesaj homoj, konkursoj, videofilmoj pri Eo, prezento de propraj programoj. Loĝado en dupersonaj ĉambroj kun lavejo, duŝoj suretaĝe, saŭno. Tri manĝoj tage, 2 busaj ekskursoj. Prezo por ĉeĥoj 85 dolaroj (225 polaj zlotoj). Aliĝoj ĝis 20-a de majo 97 al Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin PL 75-016 poŝtkesto 30. Eksterlandanoj povas pagi surloke, sed necesas sendi kun mendilo en koverto 2 respondopononjn.

### **Korespondi deziras**

Anelize Ramirez Navanjo, J8 apt 4 Distrito José Martí 90600 Santiago de Cuba, Cuba, 26-j teknikistino, (hobioj: danco, promeni, skribi, viziti amikojn) nigrulino, deziras korespondi kun ĉeĥaj amikoj.

**Lingva facileco.** En Starto 1/97 kritikis s-ano David lingvonivelon de Starto - li taksas ĝin tro scienca, malfacile komprenebla. Ni devas seniĝi de nacilingva pensmaniero per studado de eksterlandaj gazetoj. Multaj nekompreneblaĵoj rajtigas sian uzon. Juĝisto por ĝi povas esti nur Plena Ilustrita Vortaro, kie oni trovas multajn esprimojn, por nia orelo nekutimajn. JH

### **Ekspozicio en Varsovio**

„De Komenio ĝis Zamenhof“, pri kiu ni informis pasintnumere, komenciĝas 3.4.97 kaj kulminas 11.-14.4.97 per ekskursoj al Bjalistoko, koncerto de koruso Muzilo kaj sankta meso.

### **Popolnombrado en Interneto**

La enketistoj deziras ricevi milionon da respondoj el la internacia komputila reto, inter kiuj aperis ankaŭ demando pri preferata reta lingvo. Ĝis nun esperantistoj sukcesas teni duan pozicion tuj post la angla.

### Tegmento super nia kapo

Post perdo de klubejo, niaj klubanoj en Vítkovice membriĝis al loka sporta klubo, formis *teamon SSK Esperanto* kaj jam tri jarojn aktivas en disponigita ĉambro. Ĉiunmerkrede okazas kurso (16-18h) kaj programo (18-20h) - publikigataj en oficiala presorgano de la sporta klubo.

Drahomír Kočvara

